

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la pasintaj semajnoj ni komencis prezenton de la libro *Les Patries* [*La Patrioj*] verkita de **Jean Diedisheim**, aŭtoro konata de la mondfederalistoj. Tiu libro estas interesa komplemento al la de la esperantistoj bone konata *Interpopola konduto* de **Edmond Privat**.

A.- Ni hodiaŭ malfermas la libron de Jean Diedisheim je la tria ĉapitro titolita :

Cl.- *Kondiĉigo de la individuo.*

A.- Tiu analizo ŝajnas tiom utila por ni esperantistoj, ke ni ne hezitas ĝin ne nur resumi, sed komplete traduki.

Cl.- Per nia traduko kaj niaj buŝoj estas do **Jean Diedisheim**, kiu sin esprimas, Aŭdu lin:

A.- « *La sento pri patrio ne estas instinkta, kiel patrina amo, fizika amo, kaj ia alvoko religia, arta aŭ scienca.*

Cl.- *Kio estas instinkta, tio estas la ligiteco al la eta patrio.*

A.- *Por unuj ĝi estas arbaro, kamparo, por aliaj mara horizonto ; aŭ ankoraŭ ero el urbo, avenuaro, promenejoj, parko.*

Cl.- *Por ĉiuj ĝi estas nomoj balbutitaj dum la infaneco kaj gurdaj en la familiaj babiladoj.*

A.- *Sed post tio kiel naskiĝas ĉe la homo la ligiteco al la nacio, kiu entenas lian etan patrion? Ni aŭskultu la klarigon de majstro pri infana psikologio : (Jean Diedisheim fakte citas vortojn de Jean Piaget.)*

Cl.- « *Ne estas antaŭ la aĝo ok- aŭ naŭ-jara, ke infano kapablas klare ekkonscii, kio estas patrio. Ĝis tiam li konfuzegas pri ĉio. La sento kaj eĉ la nocio pri propra patrio tute ne konstituas instinkte fundamentajn aŭ frumaturajn akiraĵojn. Tiu sento aperas relative malfrue ĉe normala infano, kaj nenio ŝajnas nepre gvidi tiun senton al soci-centrismo patriota. Kontraŭe, por intelekto kaj afekcio ekkonscii sian patrion, la infano devas plenumi tutan laboron de **decentrigo** rilate al sia urbo, sia kantono, ktp. Kaj li devas ordigi sian perspektivon kun aliaj perspektivoj ; tiu laboro lin alproksimigas al la kompreno de la ceteraj patrioj kaj de vidpunktoj aliaj al la propraj. »*

A.- Jean Diedisheim tiam asertas : *Tiu analizo pri la procedo, kiu naskas dum la dua infaneco la noción patrio, unue montras, ke temas ĝuste pri proeduka koncepto kaj pri sento greŝita sur racio.*

Cl.- *Sed tiu sento trovas en la lernejo, familio, ripetado de la naciaj festoj, militdeĵoro, favoregan grundon por kreski kaj ekflori.*

A.- *Dum la longaj jaroj, kiam la cerbo kaj sentemo estas plej ricevemaj, tiom la instruado kiom la edukado firmigos ĉe la infano kaj adoleskanto koncepton pli kaj pli afekcian pri la nacio.*

Cl.- *Estas banale konstati, ke la lernolibroj pri historio ne estas senpartiaj.*

A.- *Sendube ili estas malpli tendencaj, ol iam.*

Cl.- *Ankaŭ ili malpli laŭdas la ŝaton aŭ gravon de la militaj agoj.*

A.- Sed ege malmulto kapablas ŝanĝi perspektivon. Eta korekto en la proporcioj, gravigo de ia fakto, malgravigo de alia, kaj la bildo de la nacio iĝas malsimila, ĝia legendo akiras alian signifon.

Cl.- Jean Diedisheim donas diversajn ekzemplojn, kiujn ni ne havas la tempon citi. Vi certe ĉiuj pensas pri kelkaj. Poste li daŭrigas tiel :

A.- « La libroj pri historio ne sole estas kritikataj. La latinaj tekstoj kreskigas la adoradon al la patrio helpe de la granda roma kaj de ties venkoj.

Cl.- Ĉio, do, tendencas reliefigi, antaŭ la okuloj de la lernanto, la erojn, kiuj distingas, kaj avantaĝe distingas lian nacion.

A.- Oni ne timas okaze elvoki siajn malfortojn. En pseŭdohistoriaj rakontoj, en anekdotoj, en ŝercoj oni verkas portreton pri la propra nacio kaj la propra popolo, kie estas respegulataj, en flate agrabla lumo, kvalitoj kaj mankoj.

Cl.- Rezultos ĉe la plenkreskulo grava psika reago, **kompensa** fenomeno. Kompenso de la mankoj per **prestigo de la nombro**.

A.- Individuo leĝeras aŭ emas malobei, aŭ estas tro individuema. Sed li sin vidas ĉirkaŭata de dek, kvindek, sesdek milionoj da aliaj individuoj stampitaj de la sama manko. Kia mildigo !

Cl.- Kio ! izolite oni povas esti mallaŭdinda. Se **ĉiuj** estas kiel vi, tio ne estas tre riproĉinda !

A.- Je iu grado de multiĝo, la mankoj ne plu estas mankoj.

Cl.- Tio povas konduki foren, kaj fermi la okulojn de la senvoluloj, konformistoj, aprobantoj, pri la ŝtataj krimoj, la torturoj, la gentmortigoj.

A.- Aŭ eĉ tiuj mankoj fariĝas elegantecoj, koketaĵoj. La franco estas leĝera, konsentite, li estas facilanima. Ĉe individuo, tio estas grava manko. Kiel trajto de nacia karaktero, ĝi fariĝas plaĉa, kaj... ne sen iu ŝiko !

Cl.- Tiu facilanimeco devigas lin al elturniĝemo. La alia vidalvidulo estis plumpa, sistemiga, kaj fine regata. La anglo estas lanta : malforto ĉe individuo. Jes, sed kiam kvindek milionoj da gentanoj estas lantaj, ne plu estas manko ; ili lantas, tute certe, sed post elmoviĝo, nenio kapablos ilin haltigi.

A.- La germano, li ne spritas. Kompenso lia seriozeco, konscienco igas lin ĝisfunde atentema !

Cl.- Estas memkompreneble, ke tiu popola bildaro ŝatas la mitojn kaj ne plu rilatas al la nuna priskribo de la popoloj, ĉar la karaktero de popolo, ne malpli ol tiu de individuo, evoluas.

A.- Ni povas renkonti multajn junajn viglegajn britojn, multajn ege subtilajn junajn germanojn, kaj multajn francojn metodemajn, paciencajn kaj detalemajn.

Cl.- Tamen por simplulo pluvalidas nacia karaktero, afabla, preferema kaj nete distingebla. »

A.- En la venonta prelego ni finlegos la tradukon de tiu ĉapitro.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-